

Vivo de Lanti, verko de Eddy Borsboom  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 674, 1976.09.08 & 10 & 11

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Unu el la pioniroj, kiuj plej daŭre influas la evoluon de nia movado, estas Lanti.

A.- SAT ĵus eldonis sub la titolo **Vivo de Lanti** tre interesan biografion de la fama sennaciemulo. Verkis tiun ĉi studon *Eddy Borsboom*, gimnazia instruisto en Utrecht, Nederlando. Estas en 1961 okaze de gastado en sudfranca familio, ke Eddy Borsboom kontaktiĝis kun la verkaro de Lanti. « La ideo-riĉo kaj lapidara stilo de la ĵus malkovrita aŭtoro sorĉi min » skribas Eddy Borsboom, enkonduke al sia **Vivo de Lanti**.

Cl.- Eddy Borsboom dediĉis plurajn jarojn al la rikoltado de sciigoj koncerne la infanecon kaj aktivecon de la fondinto de SAT. En la normanda komunumo Néhou li pilgrimis kun sia edzino por malkovri en kia etoso disvolviĝis la juneco de Eugène Adam, en la SAT-oficejo en Parizo li esploris arkivaĵojn, per vojaĝoj en Germana Demokrata Respubliko kaj Sovetio li povis renkontiĝi kun iamaj kunlaborantoj de la redaktoro de Sennaciulo, per korespondado li rilatis kun gastigantoj de la mondmigranto. El la amasiĝinta dokumentaro kaj el la atenta tralego de multaj gazetoj kaj libroj, Eddy Borsboom kapablis liveri al ni verkon, kiu restas absolute scienca, kvankam ĝi legiĝas kiel romano.

A.- Eddy Borsboom jene priskribas sian libron : « Tiu ĉi studo estas destinata unualoke por la membroj de SAT. [...] Mi klopodis meti la sukcesojn kaj malsukcesojn [de Lanti] en fluantan rakonton, por ke ĉiuj [...] facile povu legi la libron kaj ne forŝovu ĝin kun tedita vizaĝo. »

Cl.- Sed Eddy Borsboom restis strikte objektiva. Ni citu lin: « Nenie mi eltrovis ion aŭ plenigis per fantaziaĵoj iujn mankajn lokojn. » Li prezentas pecon da Esperanto-historio, tial lia verko havas intereson por ĉiuj, kiujn interesas la disvolviĝo de Esperanto.

A.- Utilaj aldonaĵoj riĉigas la libron. Plej rimarkebla estas la publikigo de la 170-paĝa aŭtobiografio, kiun Lanti komencis verki en decembro 1939 en Santiago. Instigis lin la legado de **Karlo** de Privat. Bedaŭrinde la malsano malhelpis lin daŭrigi tiun ĉi verkadon kaj **Fredo** restas nur fragmenta aŭtobiografieto. Ĝi alportas interesajn sciigojn pri la infaneco de Eugène Adam kaj interrompiĝas, kiam Fredo perdas la katolikan fidon profite al la anarkiisma kredo.

Cl.- Inter la aliaj utilaj aldonaĵoj ni menciuj bibliografion, liston de la verkoj de Lanti kaj Drezen, kronologian tabelon helpa por troviĝi en la studado de la libro, sciigojn pri SAT necesajn al la legantoj, kiuj ne estas membroj de tiu ĉi asocio, kaj fine indekson de personoj. Ni sentas unu mankon : tiun de indekso de la temoj pritraktitaj. La biografio disvolviĝas kronologie en 7 longaj ĉapitroj kaj ne estas tiel facile trovi precizan fakton en tiu vico da sentitolaj paragrafoj.

A.- Ni menciuj, ke la libro komenciĝas per la ĉi sekva averto : « La legantoj sciu, ke la opinio de la aŭtoro rilate la evoluon en la ideologio de Eŭgeno Lanti ne plene kongruas kun la opinio de kelkaj SAT-gvidantoj ».

Cl.- Unu el tiuj ĉi disiĝoj inter la SAT-gvidantoj kaj ilia prezidinto rilatas al la neŭtralismo. Lanti, kiu skribis en 1922 for la neŭtralismon ! kaj fondis asocion sen rilatoj kun UEA, post sia definitiva forlaso de Parizo kaj Francio en 1936, iom post iom evoluis alimaniere ol SAT.

Kontraŭe al la SAT-anoj, kiuj ĝenerale obstinis en apartiĝemo, Lanti havis sufiĉe intimajn rilatojn kun la neŭtrala esperanto-movado, kaj li eĉ koresponde instigis la SAT-gvidantojn Bannier kaj Glodeau iel aranĝi alproksimiĝon inter SAT kaj UEA. Iri al pli granda unueco en la esperanto-movado iĝis lia devizo ekde la jaro 1938.

A.- Por svisoj, kiuj intime konas la fenomenon sociologian de la federalismo, estas interese konstati, ke Eŭgeno Lanti, kiel cetere la aliaj francoj ĝenerale, ne povis koncepti la naciismon kaj ŝtatecon ekster la franca modelo. La svisa kaj usona eksperimentoj, kiuj vidas naciismojn kunfandiĝi en pli vastan federacion, restis io absolute fremda al la pensmaniero de Lanti. La sennaciulo, kiu korpe fuĝis for el la propra patrio, tamen mense malfacile kapablis emancipiĝi de franci-centra pensmaniero. Tre verŝajne la tuta SAT-movado suferas pro la sama franci-centrismo nekonscia, kaj tio klarigas, kial SAT tiel malfacile varbas membrojn en landoj, kie la politika vivo aliel evoluis ol en la ege centraligita Francio, kie la nocioj nacio kaj ŝtato kunfandiĝis.

Cl.- La venontan semajnon ni legos al vi eron el la aŭtobiografia verko *Fredo* de Lanti.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!